

4 ALNO

Alnus

 1986

Ĝuste tie, kie la plej multaj aliaj arboj ne emas kreski - sur grundoj malsekaj kaj malriĉaj je oksigeno - plej bone prosperas la alnoj. Inunditaj riverbordoj, marĉoj, marĉaj poldroj: la alno ŝatas esti subakva dum longa tempo. Aldone ĝi estas la sola ligno, kiu neniam putras subakve, do, ege utila por pontaj pilaroj, enakvaj fostoĵoj kaj riverbordaj protektpaneloj. La ligno estas ruĝa kaj povas esti facile prilaborita por ludiloj, maketoj kaj kuirejaj iloj.

Printempe la longaj viraj floroj ekpendas sur la arbo antaŭ ol la folioj aperas. La inaj alnofloroj produktas la fruktojn, kiuj restas sur la branĉoj dum la tuta jaro. Malmultaj scias, ke la alnaj burĝonoj bonas kontraŭ reŭmatismo.

Kio jes ja famas estas la konata poemo de Goethe, la 'Alna Reĝo'. Ĝi rakontas pri patro, kiu nokte galopas tra la arbaro enbrake kun sia malsana infano. La infano turnas sin al sia patro, ĉar la malbona Alna Reĝo turmentas lin per voko.

Sed vana estas la hasto de la patro...



www.josvertelt.nl



Ook in andere talen



Also in other languages



Ankaŭ en aliaj lingvoj

